

# PENSEO


*N-ro 390*

*apr. / 2024*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Rita Mkrtĉjan(Armenio)



### Dediĉita al ĉiuj virinoj!

Ŝatas mi matenon fruan  
Kaj atendas estontecon,  
Ravas vin vespero blua  
Kaj alvokas pasintecon.

Vidas vi frenezan vivon  
Mi rimarkas la belecon,  
Kiam volas vi paroli,  
Mi preferas silentecon.

Ŝatas mi la poezion,  
Vi nuntempan prozon legas,  
Vivas vi en mond' reala,  
Mi pri land' fabela revas.

Diferencas ni en vivo,  
Sed la vojo estas sama,  
En okuloj viaj karaj,  
Speguliĝas mia amo!

### Atendado de printempo

La vintro ne rapidas adiaŭi,  
Ĉiama gasto, ĝi aperas unu foj' en jar',  
Kaj kiel vojaĝantoj ni atendas  
En stacidomo, en malvarma hal'.  
La trajno de printemp' iom malfruas  
Konata necertec' alvokas nin,  
Denove ripetiĝas renaskiĝo de naturo  
Eterna voj' de tempo kaj de nia viv'.

\*\*\*

Ekfloris arbo ĉe fenestro mia,

Sur branĉoj - etaj ĉarmaj floroj,  
Demandis mi, ĉu vi ne scias,  
Ke sur la ter' suferas homoj?

Ĉagreno kaj timego regas,  
Esper' kaj kredo resti penas,  
Respondis arbo kun sopiro  
- Printemp' en sia temp' alvenas.

- Sed krom malsan' militas homoj,  
Malbonon kaj kruelon semas,  
- Ne ploru, diris blanka arbo,  
Post vintro, la printemp' alvenas.

- Verdiĝas tero, ĉio floras,  
Sed kiam sun' al ni ridetos?  
Klinigis branĉojn bela arbo  
- En vivon, la printemp' revenos!

## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



La vivo momentas,  
sed oni komentas,  
ke ĉio dependas  
de ni, kiuj pendas

nur por ionfaro  
en vivo-koŝmaro,  
dum ŝvebas sen klaro  
afera nubaro

ekde naska eko  
ĝis la lasta bleko  
dum pluvo, dum seko, -  
koleraj pro l' veko

en daŭro de tago,  
plencertaj, ke ago  
en temp' estas blago,  
probable, eĉ plago,

ĝojigas nur distro  
kaj diras ni "ĝis" tro  
nevole, sinistro  
ja nur por filistro

signifas danĝeron.  
Ni ŝatas la Teron,  
kaj, por diri veron,  
ne havas esperon

pri vivo post morto,  
do ni kun plenforto  
plu revu pri l'sorto  
de streĉa risorto.

\*\*\*

Jam sentebblas vintra fino.  
Jam printempo – la nepino  
per infana ĝoj' sincere  
min junigas vere. Se re-  
komenciĝas gajaj ludoj,  
zorgoj pri sukcesaj studoj  
en lernejo speciala,  
aŭ tre brava helpo al la  
panjo pri la kuirado –  
mi fieras. Ĉe la rando  
de la tago, ekster zorgoj  
tentas nin legado paca.  
Dormu. Ni daŭrigos morgaŭ,  
etulinjo mia laca.

\*\*\*

Mi delogis vin antaŭhierau  
dum siesto en laŭbo ĝardeno.  
Poste venis amora vesper', aŭ  
eĉ tutnokta ebri' amorplena.  
Kion diris vi – mi ne memoras,  
kion diris mi – des pli, apenaŭ,  
sed aromo siringa suflozas,  
ke la vortoj venadis kun pen', aŭ -

pro la kisoj singultaj,  
pro la kisoj sufokaj  
stumblis vortoj nemultaj,  
sed alvokaj, alvokaj! -  
Al ĉiela profundo,  
al stelara ekglimo,  
horo kvazaŭ sekundo,  
kun guteto da timo.

Via edzo, diketa kalvulo,  
kiu havas kontegon en banko,  
vin provizas per mon' sen kalkulo,  
do vi vagas kun deca afranko.  
Kontraŭ eta ŝmirmon' vi liberis  
de l'gardisto kun nuko de bovo...  
Se li tamen subite aperos –  
kredas mi, ke ne venos bontrovo  
por la kisoj singultaj,  
por la kisoj sufokaj,  
por la vortoj nemultaj,  
sed alvokaj, alvokaj!  
Renversiĝos ĉielo,  
kun stelara ekglimo,  
kaj finiĝos mielo  
kun guteto da timo.

Vi incitas, allogas kaj belas,  
kiel roz' sed kun dornoj sur tigo,  
kaj racio prudente min pelas  
fuĝi for de l' danĝera intrigo.  
Vi l' hezitojn naivajn divenas  
sed insistas pri nova vesper', aŭ...  
Mia kara, mi jam ne komprenas,  
kiu kiun delogis hieraŭ -  
per la kisoj singultaj,  
per la kisoj sufokaj,  
per la vortoj ne multaj,  
sed alvokaj, alvokaj!  
En senfundo ĉiela  
ruzaj steloj ekglimas...  
Iru for, mia bela,  
ĉar mi timas. Mi timas!

El "La pekaj kantoj"

24.02.2016

## Ángel Arquillos (Hispanio)



### Komplika digesto

Mi ne plu havas respondon,  
 Ĉar mi vole nevole englutis  
 miajn lastajn skeptikojn.  
**Komplika digesto!**  
 Tra mia stomako fluas rivero  
 kaj ĝi moviĝas senhalte  
 kiel sinua serpento.  
 Mi jam ne plu skeptikulas,  
 ĉar mi fariĝis kredanto  
 de la nenieco.  
 La vivo min sekvas  
 kaj mi tro rapidas,  
 ĉar lanto min ĝenas  
 kaj mi timemas.  
 La tempo starigis barieron  
 kaj mi restas senforta  
 pro mia komplika digesto.

## Yohanes Manhitu (Indonezio)



### En ĉi tiu vagono

Mi en ĉi tiu vagono  
 estas neligita, libera!  
 Miaj okulgloboj sovaĝas  
 rigardante la radojn,  
 kiuj senlacas.  
 Mi estas en ĉi tiu vagono.  
 Kion mi vidas estas tio,  
 kio estas preterpasata,  
 kio estas alfrontata  
 sen silento.  
 Mi en ĉi tiu vagono  
 devas kliniĝi,  
 devas ŝviti.  
 Estas rido,

estas ploro.

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



### Jartempoj

Nokto Silenta  
 sanktas pro enkarniĝo  
 de l' Eminentia.  
 Frujar' jubilas  
 en lanterna festo dum  
 plenluno brilas.  
 Jartemp' prospera  
 impetas favorglore  
 kun am' tenera.  
 Sezono bunta  
 ravante jubilas pro  
 rikolt' abunda.

## Penso pri Pasko

Ĝojas la tero,  
 primavero revenas  
 plen-de espero.

Dank' al Sinjoro  
 ĉiuj vekiĝas el dorm'  
 en mar' de floro.

Dum pask-konkero  
 mesio resurektas  
 post kruc-ofero.

Ĉiuj jubilas  
 pro resurekt' de Sinjor',  
 sanktlumo brilas.

Dio donacas  
 eternan vivon al ni,  
 dum glore gracia.

Ne plu 'stas morto  
nek sufero plorplena,  
jen nova sorto!

Eterna vivo  
estiĝos se ni fidas  
en efektivo.



## Paska fajro

Ĝojas jen ridante l' vasta tero,  
revenante la printemp' jubilas.  
Nova mondo plenas de espero,  
paska fajro inspirante brilas.

Nin savanta grace la Sinjoro  
ardoplenan vervon nun donacas.  
Ni ebrias en la mar' de floro,  
sankta amo glorsolene gracias.

Mastro vivofontas de prospero,  
post la resurekto ne plu mortas.  
Pro l' redempto per-de kruc-ofero  
la dankendaj homoj nove sortas.

Baldaŭ estos jam eterna vivo,  
se fidelas ni en efektivo.

## SEZONAĴ VENTOJ

Brizo blovas primavere  
susurante jen tenere  
kiel via dolĉa kiso  
kun aromo de narciso.

Vento blovas frusomere  
murmurante tra-aere

kiel via mildkareso  
kun amika korpromeso.

Zefiro blovas aŭtune  
flufrante freŝe subsune  
kiel sincera konsolo  
ame plene de bonvolo.

Ŝtormo blovas frostvetere  
hurlante tiel severe  
kiel tempest' sur neĝmonto,  
kia mizera renkonto.

Dum ŝtormo hurlas, ne timu!  
en tempest' vin ne deprimu!  
Ĉe ni restu ĉiam primavero,  
ni beatas die kun espero!

## Jadranka Miric (Serbio)



## Grizas ĉielo

Blanka rozo  
velkinta, en la vazo  
senakva. Sensuna tuŝo.  
Doloras tia ĝia morta pozo.  
Senhoma hejmo. Silento  
timigas. La ĉambro senluma  
malbonodoras. Via favorata mento-  
odoro delonge malaperis. Mankas  
vento!  
La griza surtuto transe de la seĝo  
pendis. La nigra pantalone dece metita  
vane atendis vian aperon. La tempo  
limigita  
jam pasis. Ĉi-foje venkis morto-reĝo!

## MAGIO DE NATURO

Eliris suno honte  
tuj post aŭrora magio.  
Ĉeestis mi al tiu magio volonte  
ĝuante tutanime en ĉio!

Suno naskiĝas oriente  
 en la pompa vualsatena ĉielo.  
 La tuta ternaturo vekigigas  
 diversvoĉe ĝin salutante.

Salutflugo al sunnaskiĝo  
 venas ne nur de bestar' sur la ter'  
 Ĉiu fonteto aŭ la granda river'  
 ĝoje ŝveligas kun ŝaŭmmira ondiĝo!

## Pensoj pri vi

Grizas ĉielo.  
 Malvarmas veter'.  
 En la kavo daŭre kaŝita dormas melo.  
 Drako ne flugas alten en aer'.  
 Martaj pluvoj  
 atendataj estas.  
 Rare okazas fulmoj  
 eĉ ne aŭdiĝas tondroj.  
 Ĉe riverbordo staras vi  
 sub pluvombrelo ruĝkolora.  
 En manoj letero skribita de mi.  
 Sur vento ondiĝas ŝia hararo ora.

## Kiel kanti

Kiel kanti pri amo  
 kiam ĉiutage bombadas nin  
 kun raportoj pri homa kruelaĵo  
 super alia homo. Justolamo!  
 Kiel homoj povas kompreni  
 kiam ili tiajn homojn subtenas,  
 eĉ ilin nepre premigas.  
 Ĉu pro bone farita fi-naŭzaĵo?

### Erika Godó (Hungario)



## Neĝborulo

Neĝborulo, blanka beleco por la ĝardeno.  
 Ĉi tio estas antaŭsigno de printempo.  
 Ĝi estas floro, kiu vekigigas sub la neĝo.

Eta miraklo, kiu brilas eĉ en la malvarmo.  
 Blankaj petaloj, delikataj kaj elegantaj,  
 Ĉi tio alportas grandan ĝojon al niaj koroj.

## Ponto de ĉielarko

La ĉielo brilas en mirindaj koloroj,  
 kiam la suno eliras post la pluvo.  
 La mirinda bunta ĉielarka ponto,  
 kiun la sunradio konstruis el pluvgutoj.  
 Ĝi estas ponto inter ĉielo kaj tero,  
 ni ne scias, kien ĝi kondukas.  
 Sed trairu ĝin kuraĝe, ne timu,  
 viaj revoj atendas ĉe la alia flanko.  
 La ĉielarka ponto montras mirindan vojon,  
 kie espero kaj amo renkontas unu la alian.

## Poetoj

Poetoj, kiuj kreas vivon per vortoj sur  
 papero,  
 Ili teksas emociojn el la profundo de siaj  
 koroj.  
 Ili pentras la mondon bunte per rimoj, kiel  
 sorĉistoj, kiel revuloj, ili malkovras la  
 sekretojn de la homa animo.  
 La fonto de inspiro loĝas en la animoj de  
 poetoj,  
 ili esprimas per vortoj tion, kio vivas en iliaj  
 koroj.  
 Ĉiu poemo estas kiel stelolumo en la nokto,  
 ho poetoj, kies pensoj flugas sur la flugiloj  
 de la libereco.

### Ivanichka Magharova (Bulgario)



Vintra noktomez'.  
 En ĉambro bluso sonas.  
 La lito mutas!

Senhejmsunsubir'  
 rigardas la fenestron.  
 Sola mi estas.

Glacia maten'.  
Frosto sur vitr'. Li solas.  
Kandel' finbrulas.

Fromaĝan faston.  
Mi pardonpetas, panjo.  
Ŝi ne parolas.

Jam mateniĝas.  
Bela kanto eniras mian  
ĉambreton.

## Vinícius de Moraes

### Amo enlarime

Notu l' maron en singult', ja solas ĝi  
Am' notu l' maron en singult'  
Ja tristege solas ĝi

Sed tamen am' vi notu l' ventojn  
Tiujn ja eraralvenajn  
Super l' ondoj, kline kultajn  
Kaj singultajn pro pasi'

Kromnotu am' kiel tra l' nokto  
Sub la vento l' arboj staras  
Kline knaras ili kulte  
Vesingulte en anksi'

Am' korpon ardan, por momento  
Kiel l' arboj kaj la vento  
Ĉe vin allasu, klinkultan  
Kaj singultan pro pasi'

**Paulo César Pinheiro kaj João  
Nogueira**

### La povo krei

Por ke estu samb' estu pli ol bontrovo  
Jam ĝin influas unika krepovo  
Lasanta ĉiujn en admir'

Neniel gravas ĉu oni feliĉas aŭ tristas  
Aŭ ĉu en rava loko medite persistas  
Ne tiel sin montras inspir' [ Ho ne ]

Ĉar , verŝajna lum' , ĝi aperas subite  
Ĉe l' kor' kaj menso de l' poet' incite  
Ĝis la plenumo de l' dezir'

Ĉu tio ĉi  
Ne sufiĉus al penso pri forto supera  
Senteblas ĝi  
En la nokt' , en la tago , ho kiom etera  
Superfluas emoci'

Kaj la poeto sin lasas prenata de ĉi magio  
Versoj sekvas kaj al tio sin sekvas melodio  
Kaj la homoj ariĝas en kanto: La ra  
La ra ra ra  
La ra  
La ra ra



## Abílio Mesquita

### La Vilaĝo kaj la Urbo

*Iam la urbo demandis la vilaĝon:*

- Vi simpla, kiu vi estas?
- Kaj kiu fin-estas vi?
- La nobelar' de la Urbo .
- Vilaĝ' en Portugali' .
- Mi havas belajn gemojn,  
mil juvelojn buntkolorajn ...
- Ĝardenojn florajn mi havas,  
tiujn ho kiom valorajn ...
- Mi havas ĝojojn kaj ridojn ,  
distraĵojn certe konstantajn .

-- Muzikon mi havas, fontas  
birdidojn ĝi dolĉe kantajn .  
-- Al mi la laŭrojn: jen lumas  
miaj noktoj ja sen limo.  
-- Mi havas la sunon tage,  
nokte l' lumon de l' animo ...  
-- Mi loĝas en brilpalacoj  
disaj tra l' Urbo en kvanto!  
-- Mi en malgranda kabano  
kisata de l' Sun' kun vanto!  
-- Pri mi versas Historio,  
verŝajne preter ajnspito ...  
-- aj mi historion havas  
skribitan kun mia ŝvito .  
-- Ĉi lukso de vi vidata  
unikas al mi laŭ deco.  
-- Mian lukson mi nur vantu:  
ĝui l' tagon en simpleco!  
-- Ĉiuj la preterpasantoj  
ial ĉe mi haltas gape ...  
-- Mia rosmarenaromo  
multajn logas seneskape.  
-- Vere nenion vi havas,  
jes mi riĉas pli ol vi!  
-- Nu al mi enbruste pulsas.

*elportugaligis*



**Wellington Rocha**  
(Brazilo)

**Mikaelo Argisto**

**Mi**

trovas en la kunŝirantaĵo firmtenadon  
mi saltas el la ciklo de l' senfineco  
mi disipas malpli da energio  
mi plenumas por mi la revojn de Dio  
mi ventumigas mian vivon  
mi permesas al mi tempon de kvieto  
mi ĉiutage bonfartigas vin  
mi ĉiam atentante aŭskultas vin  
mi plantas la vorton en la grizon.

mi rikoltas la lumon de l' mondo.  
mi migras kun vi en la benatecon.

*tradukis*



**Hans-Georg Kaiser**  
(Germanio)

\*\*\*

**Kong Lingguang**

*Printempa Ekvinokso*

Kiam la tago kaj la nokt' alternas  
en samlonga tempo,  
Oni plugadas kaj semadas sur la kampo  
apud vojo.  
Kiam sunbrilo prosperigas la naturon  
de printempo,  
Jen la zefiro jam varmigas mian koron  
kun la ĝojo.

*elĉinigis*



**Ardo (Ĉinio)**

**Elena Popova (Bulgario)**



**Pigo sur dorso**

Ĝi estas longvosta, kun nigra dorso kaj  
nigra beko. Ĉu vi aŭdas ĝin? "Gra - gra -  
gra!..." Oni diras, ke ĝi estas utila, sed ĝia  
famo estas malbona - se ĝi malfermas bekon,  
ĝi portas klaĉojn de korto al korto.

Mi iam demandis ĝin:

- Pigo, ĉu vi havas domon?

- Ne! – respondis ĝi - estas multaj lokoj por  
loĝi sen zorgoj. Krome, ne indas, mi flugas  
suden aŭtune, al pli varma loko...

- Sed la aliaj birdoj faras novajn aŭ riparas  
malnovajn nestojn...

Silento.

- Kaj kie vi demetas viajn ovojn?

- Nu, . . . en la nesto de iu alia...

- Tre malbele!

- Ĉu vi preparas manĝaĵon pri la vintro?

- Kial mi devas labori? Kaj mi foriras ...Tie, kiam mi malsatas, mi ĉiam trovos ion.

- Mi komprenas, ke vi estas mallaborema.

- Ho, kian malagrablan vorton vi uzas! Aŭskultu, mi vere estas tia laŭ naturo. Necesas miloj da jaroj, por ke ni ŝanĝiĝu, kiel diris nia praavo...

La babilemulo estas konata birdo, kiu havas gefratojn ankaŭ inter la homoj. Ne vane la proverbo diras pri iu, kiu havas nenion, ke: "Li vivas kiel pigo sur dorno".

## Rudina Muharremi Beja



**MIA PENTO**

Ŝajnis min kvazaŭ mi perdis la sunon,  
Perdinte la hejmon en mia patrio,  
La lunon kiu ĉiam rigardis min defore  
Kaj la deziron por denove reveni tie.

Enuigita, mi ankoraŭ foje pretigas la  
valizojn

Por la restinta pento, la tristo kiel memoraĵo  
Kaj plonĝas denove en la nuba nebulo,  
De la sopiroj, por adiaŭi al mia lando.

Ankoraŭ eĥadas ĉe mi la memoraj voĉoj,  
La venta ĝemado, la akumulita dispneo,  
La patrina ĉirkaŭbrako, tiuj de la  
proksimuloj,  
Kaj la larmoj, ĉiam, enverŝitaj solece.

Vane mi enuas kiam min demandas,  
Kien mi iros postkiam mi revenos?!  
Ĉie mi trovos la dolĉan amon,  
Tiun kreskanta nur tie..la eternan.

Kaj silente mi kuras tra la nuba trombo  
Tra la nokta sorĉeco, pendita en la krepusko  
Tra la senfortiĝaj herbejoj, vekitaj en la  
printempo

Por atingi la animan sanktecon!

## La morgaŭo

La morgaŭo estas blanka papero preta por  
skribiĝi,

La kanvaso kie la pentroebloj estas senfinaj,  
Estas nova ĉapitro,

Portanto de la revoj, de la esperoj...

La morgaŭo portas per flugiloj novan  
tagiĝon,

La eblon por lerni,

Por kreski.

Ĝi estas la nekonata vojaĝo trans la revo  
Al la memo dezirata..

La morgaŭo renversas la nokton,

Ĝi vestas ĉiujn kolorojn

Misterojn, necertecojn,

Portas defiojn, kuraĝon por ilin transpasi

Kaj kiam la suno interŝanĝiĝas kun la steloj,

Ĝi etendas la brakojn super la urbo,

Por nova starto.

## Grueja Nuk Asht Hyjni



**La virino ne estas diino**

La virino ne estas diino

Ŝi estas homo

Kiel vi

Gravas ke vi komprenu ĉi tion

Alie vi furiozus kiam ŝi ne plenumus viajn  
petojn

Kaj malbenus ŝin plej malbone.

La virino ne estas floro

Ŝi estas homo

Kiel vi

Gravas ke vi komprenu ĉi tion

Alie vi furiozus kiam ŝi ne florus silenta

Kaj vi elradikigus ŝin plej malbone

La virino estas nek la tero

Nek la rivero

Nek la radio



Nek la ĉielo  
 La vizio  
 Aŭ la revo  
 Ŝi estas homo  
 Kiel vi  
 Gravas ke vi komprenu ĉi tion  
 Alie vi furiozus kiam ŝi plenenspirus  
 Trinkus akvon  
 Aŭ irus al la necesejo  
 Kaj vi kriaĉas al ŝi plej malbone.  
 La virino povas fariĝi  
 Io ajn ŝi povas fariĝi  
 Nur se tiel fariĝus  
 Ankaŭ vi.  
*elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**  
**(Albanio)**

\*\*\*


**Chen Yi (1901-1972)**

## *Verda pinarbo*

Sub neĝa amaso terura,  
 sin pino rektigas kun belo;  
 La arbo sin montros alt-pura,  
 kredeble nur post fordegelo.

*alia versio*

Sub la neĝa premo,  
 pin' rektigas sin kun belo ;  
 Ĝi sin montros alta,  
 jam post fordegelo.



*elĉinigis*



**Gajo (Ĉinio)**

**Aimee Degallier– Martin (1905 – 1987)**



## *Vi estos Ĉefo*

Vi estos Ĉefo, ĉu konsentas vi?''  
 Ne morgaŭ kaj eĉ ne hodiaŭ,  
 sed kiam venos la decida hor'.

Kiam la vivo via rektos kiel kano  
 Kaj simplas kiel kanto de alaŭd'.

Ĉefo – do, ne tiu, kiu postuli kaj ordoni volas,  
 Kiu subigas ĉiujn kaj altrudas sin.  
 Kiu permesas-malpermesas, kulpigas-laŭdas,  
 Kaj kiu punas aŭ pridonacas.

Ĉefo - iu tute alia. Tio - multe pli.  
 Ĉefo - tiu, kiu al si altiras ĉiujn,  
 al tio ne strebante kaj eĉ ne sciante.

Al kiu subiĝas oni propravole kaj,  
 trovinte la animfortecon lian, postiras lin.  
 Li ĉiutage estas tia sama -  
 stabilas, rektas li kaj ordinaras.

De malproksime li vidigas sin kaj iras plu,  
 en la profundon de l' animo penetrante.  
 Ĉefo...

Bonvenas ĉefo, kiam lacas ni.  
 Li anstataŭ ni decidu, pensu  
 kaj restus por ni simple sekvi lin.

Domaĝe, ĉefoj en la mondo raras,  
 almenaŭ tiuj, konfidi kiuj indas.

Vi estos Ĉefo, ĉu konsentas vi?  
 Ne morgaŭ kaj eĉ ne hodiaŭ,  
 sed kiam venos la decida hor'.

Por ĉefi – ne signifas ŝanĝi ĉiujn,  
 altrudi opinion sian, manieron  
 kaj persekuti ilin per ordonoj, atentigoj  
 por ke aliaj estu tiaj, kia estas vi.

Por ĉefi - sekve, decas virte vivi kaj malkaŝe,  
 la pardon lasi malfermitan kaj fenestrojn.  
 Por ke alvenu ĉiu, kiu volas.

Vi estos Ĉefo, ĉu konsentas vi?  
 Ĉefo postulas multe de si mem, preskaŭ nenion de  
 aliaj.

Severas li al si, sed al aliaj pardonemas.  
 Li scias, ke facile cedas afero, do, neniu kaj  
 por ke plenumi ĉion, bezonatas pen'.

Ĉefo - amiko via. Kredas vi, ke li ol vi meritas pli.  
 Apud mi vi sentas vin pli bona, ol estas vi.  
 Jen pro kio vi elektis lin.  
 Jen pro kio lin vi nomas "Mia Ĉefo".  
 Vi estos ĉefo.

*\*Aimee Degallier- Martin naskiĝis 1905 en Moskvo (Ruslando). Ŝia patrino – rusino, patro- svizo. Ekde junaĝo Aimee Degallier estis skoltino. En Ĝenevo (Svislando) ŝi gvidis skoltan movadon. Ŝi ankaŭ partoprenis internacian skoltan movadon kaj aktivis en Belgio, Francio. Aimee Degallier-Martin eldonis tri kolektojn de siaj poeziaj verkoj, kiuj temis pri skolta vivo kaj principoj de skolta movado, kaj pri religiaj temoj. Ŝi verkis en franca lingvo. Aperis tri literaturaj almanakoj sub la sama titolo: "Le livre de Lezard" (La libro de lacerto). Tiu ĉi verko "Vi estos ĉefo" aperis en dua almanako. En litovan lingvon tradukis ĝin Vitautas Nistelis, arkitekto, poeto, tradukisto, poligloto.*

Ellitovigis



**Laimundas Abromas**  
(Litovio)

## El la ĉina antikva poezio

### Li Yu (937-978)

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Ĉiuj ĉerizberoj falis al la ter',  
 la printempo jam foriris.  
 Paroj da orflavaj papilioj en aer'  
 ĉirkaŭflugas tien kaj alien.  
 Okcidente de la domo, en malhel'  
 nokta jen kukoloj triste krias.  
 Tra l' fenestr-kurten' kroĉita per hoketo  
 mi nur vidas pendi fumon de vesper'.

Homoj malaperas kaj en strato  
 regas dezerteca la kvieto.  
 Nur videblas fumspiraloj  
 kaj malklaras herba silueto.  
 Fumo el incens-cindrujo

ŝvebe svingiĝetas en venteto,  
 kaj la feliks-desegnaĵ' sur ujo  
 estas jen bakata de fajr-ĵeto.  
 Kun satena vesto en la mano  
 ŝi ĉagrenmiene pensas  
 pri pasinto, kun larmmakulita tualetto.

—laŭ melodio *Ondo lavas sablojn*

Pripensi paseojn pliigas ĉagrenon  
 ve, en mi eĉ antaŭ pejzaĝo plej bela,  
 neniel mi povas forigi tristecon.  
 Kirliĝas aŭtuna ventpelo kruela  
 en kort' kun muskplenaĵ ŝtonŝtupoj.  
 Mi lasas kurtenon falpendi ŝancela  
 tuttage, ĉar al mia domo okazas  
 neniu vizito de gasto sincera.

La fera armilo jame enteriĝis  
 kaj mia subluma batalemo  
 jen ankaŭ kovriĝas per herboj.  
 La luno leviĝas kun klara mieno  
 en malvarmiĝanta aŭtuna vetero.  
 Palaca etaĝdom' en malpleno  
 da homoj ja restas, sed nur la konstruaĵon  
 spegulas Rivero Qinhuai sen sveno.

—laŭ melodio *Dankon por nova favoro*

Neniu povas ja reteni la aŭtunon  
 fadantan ĝis la nul',  
 folioj ruĝaj kovras ŝtupojn  
 en svaga la vespernebul'.  
 La Festo de Duobla Naŭo venas  
 kun vent-murmur'.  
 Vidaĵo sur teraso alta  
 ja tristas sen plezur',  
 aromo de kornus'\* forsvenas  
 laŭ venta lul'.

Odoro de purpuraj floroj  
 alŝvebas al la kort'.  
 Vespera la nebulo en pluveto  
 difuzas kun malfort'.  
 Sovaĝansero plorsingulte gakas  
 sen komfort'.

Sopiro mia jar' post jaro samas  
laŭ mia malbonsort'.

\*kornuso: *Cornus officinalis*

—laŭ melodio *Floroj en malantaŭa korto*

Jadsimila arbo staras jen en posta la ĝardeno,  
jaspaj herboj reflektiĝas en spegulo bronza.  
Lastajaraj floroj ja ankoraŭ freŝas en  
sukpleno,  
La ĉijara lun' rondiĝas post malkreska  
fenomeno.

Ho, l' ĉiel', ne favoru  
nur la lunon kaj la florojn ĝis ekstremo,  
ankaŭ eternigu la junecon sen forsveno.

—laŭ melodio *Longa sopiro*

Montvico kaj montvic' en foro,  
ĉielo altas kun malvarma la vaporo  
de la fumeca nebulo.  
Sopiro mia fajras kiel la acerfolia ruĝkoloro.  
Disfloras krizantemoj,  
defloras krizantemoj.  
Sovaĝanseroj flugas suden kun gakada ĥoro,  
sed mia hom' ankoraŭ ne revenas en ĉi horo.  
Nur vento kaj la luno ekster pordkurteno  
senĝene restas sen disig-doloro.

—laŭ melodio *Silk-lava rojo*

Kiel flagranta kandellum' en vento  
aŭ lemn' flosanta sur lageto  
ja mia vivo ŝajnas sonĝo.  
Kie mi povus serĉi en ŝanĝanta preto  
antaŭan spuron en la mondo?  
Laŭ providenco mi senpovas sen rimedo.

Mi staras ĉe l' lageto kaj rigardas  
la fluon flui vane, senkompate.  
La ombro de etaĝdomoj, pavilonoj  
jen baras al mi vidon vespere-invade.  
Mi ascendas altan turon por priserĉi,  
larmperloj miaj falas miriade.

—laŭ melodio *Ĝoja tempo*

Kreskigas blankajn harojn al mi la ĉagren',

la kariero etendiĝas supren kaj malsupren  
ja kiel blua monto, kiun mi grimpadas.  
En monto senhoma min atendas la neĝplen',  
el la sovaĝej' mi hakas vojon por reven'.

—laŭ melodio *Kanteto de tri terasoj*  
Mi maldormas laca de longlonga nokto,  
kun la vest' surŝultre elen mi promenas.  
sub la lun' aŭtuna bambuaro tremas,  
sub vipado venta la fenestro ĝemas.

*elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**

**Du Fu (712 — 770)**

*Panoramo de Monto Tai*

Kiel Mont' Tai tiel aspektas mirinda?  
inter landoj verdas senlimlabirinta.  
Vervbeleco jen kreitas de l' naturo,  
sud' kaj nordo dise lumo kaj obskuro.

Mia brusto pulsas kiel nubtavole,  
foren mi rigardas birdojn flug-laŭvole.  
Certe iam mi sor grimpos al kulmino,  
alimontoj malaltiĝus kvazaŭ klino.

\* *Monto Tai (prononce: taj) estas la bonkonate  
impona grandioza monto en Ĉinio.*

elĉinigis **Yi Qiao (ĉino en Germanio)**

**Ĉineske**

**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**

*Printempo*

— laŭ ĉinesko *printempo en sudlando*<sup>1</sup>  
Jen vastas  
mar' de flor'.  
Rojo klar-lirlas  
al la valo for.

Mondo plen-de espero  
kun junfiera fervor'.

Petaloj  
en mildbriz'  
flirtas tenere  
kiel dolĉa kis'.  
Mi revidas vin trance  
kvazaŭ jam en paradiz'.

Aŭrore  
ĝojas Ter'.  
Printemp' revenas  
plene de esper'.  
Mesio resurektas  
vivofonte de prosper'.



## Vejdo (Ĉinio)

### Dummilitaj rifugantoj

—laŭ ĉinesko *Aŭguristo*<sup>2</sup>  
Ĉe bomb-eksplodo  
vivriske kuras  
kaj al ŝirmejo ili  
peze susuras.

Sub kugla pluvo  
kaŝe preĝjuras  
ili en densa arbar'  
kaj somnambulas.

Ilin ja premas  
malsat-sufero  
kaj hunde vivaĉas, ve,  
en mava sfero.

Milit' minacas  
ja kun kruelo.

Ili dronas kun timeg'  
en malespero.

## Poplo

—laŭ ĉinesko *Moruskolektanta knabino*<sup>3</sup>

Ĝi staras en pluvego,  
sen agoni'  
sed kun defi'  
kontraŭ la pluva mani'.

Kvankam ĝi ja malfortas,  
kun eta kri'  
kaj kun larmstri',  
ĝi luktas kun energi'.

Post pluv' la sun' leviĝas  
ĝi kun koket'  
kaj kun plenkred'  
svingas branĉojn sen diskret'.

Mi ŝatas l' etan poplon.  
Ĝi jam en pret'  
jen por veget'  
fortika sen ajna ced'.

## La rivero

—laŭ ĉinesko *Feniksa harpinglo*<sup>4</sup>

La river'  
en liber'  
torentas kun sabloter'.  
Rapidflu',  
kun laŭtbru'  
kuras maren,  
onde kun sku',  
nu, nu, nu!

En suna hel'  
ĝi kun fier'  
impetas ja kun leĝer'.  
Ĝi kun ĝu',  
sen detru',  
jen sin lulas  
en bordoj du,

plu, plu, plu!

## Jadranka Miric (Serbio)

### PRINTEMPO FLORAS

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo<sup>5</sup>

Ŝanĝiĝe  
 pritempas veter'.  
 Varma venteto blovis  
 tenere. Ja, tuta ver'  
 freŝiĝas aer'.

Varmiĝis  
 kaj verdiĝis ter'.  
 Urso forlasis kavon.  
 Stratoj vigliĝis. Kver'  
 eĥas en aer'.

Krokusoj  
 mire ekfloris.  
 Ĉie videblis uloj  
 dum ĝoje promenadis.  
 Fine printempas.

Ni ĝuis  
 en milda suna  
 karesado. Volonte  
 pozis la vizaĝo-kuna,  
 ĝis lumo luna.

Ĵaluzaj  
 homoj elpensis  
 militon. Tial ĉagren`  
 tre rapide vastiĝis.  
 Nun, ĝojo mankas!

1. *Printempo sude de rivero* (ĉine: *jiangnanchun*): ĉina fikforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo *xa,xa,xa* (*x=senrima*)

2. *Aŭguristo* (ĉine: *busuanzi*): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.

3. *Moruskolektanta knabino* (ĉine: *caisangzi*): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de *xa, a,a*.

(*x=senrima*)

4. *Feniksa harpinglo* (ĉine: *chaitoufeng*): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1\*, 1\* silaboj, kun rimaranĝo de *aaa, bxbxBB* kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

5. *Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x=senrima*).

## Erika Godó (Hungario)

### La feliĉo

Iam estis urbeto ie en la granda mondo, kie homoj pasigis sian ĉiutagan vivon en malfeliĉo. La grizaj tagoj mallumigis iliajn korojn, kaj iliaj vizaĝoj montris nur lacecon kaj malĝojon, kaj tiel daŭris jaroj. Iu tago tamen alvenis en la urbeto mistera fremdulo. La fremdulo ĉiam ridetis kaj liaj okuloj radiis de feliĉo, feliĉo eliris el lia tuta estaĵo. Dum li promenis sur la stratoj, li donacis malgrandajn gestojn kaj afablajn vortojn al homoj, kiuj komence opiniis tion stranga. Rideto, brakumo aŭ kuraĝiga vorto, kiu bezonis, kion kaj ĉio ĉi ŝanĝis la mondon de homoj kaj pensmaniero.

Feliĉo malrapide ekdisvastiĝis en la urbo, homoj ridetis unu al la alia, helpis unu la alian kaj lernis aprezi la etajn ĝojojn de la vivo. Homoj sentis, ke floroj disfloras pli bele, birdoj pli melodie kantas, kaj la sunradioj pli varme karesas iliajn vizaĝojn. La loĝantoj de la urbeto vere ŝanĝiĝis. Do la fremdulo iris al aliaj urbetoj por planti ankaŭ tien malgrandan semon de feliĉo. Tamen la magio restis por ĉiam en la urbeto kaj homoj jam ridetis, nur feliĉo estis videbla sur iliaj vizaĝoj. Homoj sciis, ke feliĉo dependas ne nur de eksteraj cirkonstancoj, sed ankaŭ de ilia sento aŭ penso interne. Tiel la feliĉo fariĝis magia forto, kiu trapenetris la animojn de homoj kaj ŝanĝis ilian vivon por ĉiam.

Ĉiuj kapablas teni feliĉon en la koro kaj kunhavi ĉi tiun miraklon kun aliaj.

## Lilia Nikolova (Bulgario)



- Ĉu larmo? Kia larmo? - la hirundeto maltrankvile leviĝis.

- Patrino. La historio de mia vivo estas mallonga. Antaŭ naŭ tagoj, laca kaj larmoplena hirundo alflugis sur la maston de granda oceana ŝipo. Mi staris en la dekstra okulo de la malĝoja birdo. La oceano muĝis. Forta vento blovis. Per mallaŭta voĉo la hirundo parolis al la vento:

- Frato Vento, kiam vi trairas la mondon, se vi trapasas Bulgarijon, haltu ĉe mia orfa birdeto kaj diru al ĝi, ke ĝi gardu sin de la nigra kato, kiu vagas en la ĝardeno." Mi forgesis averti mian idon kiam mi foriris. Diru al ĝi ankaŭ, ke mia koro sekiĝis pro tristo.

- Kie estas via hirundo?" demandis la vento.

- Mi lasis ĝin en fendohavaan poton, renversitan, en la ĝardeno, kie floras la krizantemoj.

Kiam la maljuna hirundo diris tiujn vortojn, mi estis for de ia vido. La vento kaptis min kaj ekportis min tra la mondo. Mi flugis dum naŭ tagoj. Nun mi falis sur tiun ĉi floron. Kiel mi estas laca! Mi volas ekdormi.

La koro de la kripla hirundo turniĝis. Ĝi stariĝis rapide, malfermis la bekon kaj englutis la kadukan larvon de la patrino.

- Dankon, panjo! - ĝi flustris, kuŝiĝis en la lanugo kaj ekdormis, varmigita de la larmo, kvazaŭ ĝi estis sub la flugiloj de sia patrino. Omaĝe al la memoro de Angel Karalijĉev! - aŭtoro de la rakonto "Patrino larmo"

## Proverbo: "Neniam parolu al azeno"

La azeno diras al la tigro:

- La herbo estas blua.

La tigro respondas:

- Ne, la herbo estas verda!

Kverelo eksplodis kaj ili iris al la leono, reĝo de la arbaro, por solvi siajn diferencojn.

Antaŭ ol ili atingis la lokon en la arbaro, kie la leono sidis sur sia trono, la azeno ekkriis:

- Via Moŝto, ĉu estas vere, ke la herbo estas blua?

La leono respondas:

- Jes, ja, la herbo estas blua.

La azeno estis feliĉa kaj daŭrigis:

- La tigro ne konsentas kun mi, kverelas kaj ĝenas min. Bonvolu puni lin.

La Besta Reĝo anoncis:

- La tigro estos punita per 5 jaroj da silento.

La azeno ĝoje eksaltis kaj plu ripetis multfoje:

- La herbo estas blua, la herbo estas blua...

La tigro, akceptinte sian punon, demandis la leonon:

- Via moŝto, pro kio vi punis min? La herbo estas verda, ĉu ne?

La leono respondas:

- La herbo ja estas Verda.

La surprizita tigro demandis:

- Kial do vi punas min?

La leono respondas:

- Ne rilatas ĉu la herbo estas blua aŭ verda. Vi estas punita ĉar kuraĝa kaj inteligenta besto kiel Tigro ne povas pasigi sian tempon diskutante kun azeno Kaj pooste vi venas al mi kun ĉi tiu demando.

La plej malbona tempoperdo estas disputi kun malsaĝulo kaj fanatikulo, kiu ne interesiĝas pri vero aŭ realo, nur pri venko de siaj kredoj kaj iluzioj.

Neniam malŝparu vian tempon pro sencelaj disputoj. Estas homoj, al kiuj kiom aj pruvojn kaj faktojn vi havigi, ili ĉiam ne povas kompreni. Ili nur volas pravi, kvankam tio ĉi estas malproksime de la ĝusteco.

Kiam la malklereco krias, la inteligenteco silentas.



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

[www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm)

